# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

PRIEURE SAINT-MARTIN
77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
FRANCE

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro A. BESSIERE 28, rue C. Saint-Saëns 76000 ROUEN
Sekr: F-ino G. PREUX 55/3 Terrasse Rue du 11 novembre 59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue Milngavie 49250 BAUGE
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon 59800 LILLE
Peranto IKUE: P-ro R. DEGRELLE 12, r. Estienne d' Orves 54490 PIENNES

C.C.P: Association Catholique Française pour l' Esperanto 2 324 93 N ROUEN.

==== la n°: 8 F. Abono: 30 F (TTC). Kotizo: 10 F. Sume: 40 F. ====

==== N° 176 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== MARTO 1993 ====

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent <u>nepre antaŭ</u> la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

## LE MOT DU PRESIDENT

Dans quelques semaines, nous serons rassemblés au pied de la grotte de Massabielle.

A travers Bernadette Soubirous, fillette inconnue - mais Dieu choisit souvent les humbles - le message de la Vierge s' adressait à la société brillante et prospère du Second Empire, qui avait tendance à privilégier les profits matériels au détriment des valeurs spirituelles. Il s' agissait d' un appel à la pénitence et à la prière, mais aussi à l' espérance et à la confiance, ainsi que l' écrivait Daniel Rops.

Cet appel sera entendu et dans les années suivantes, les pèlerinages à Lourdes prendront un essor d' autant plus surprenant que les hommes politiques de l' époque entraveront souvent l' action de l' Eglise. -

Qui oserait affirmer que de nos jours le message de Lourdes soit périmé? Certes notre société actuelle, au lieu de connaître la prospérité économique du siècle dernier, se débat dans des difficultés et connaît le chômage générateur de soucis et de préoccupations. Mais la société est toujours tournée vers les plaisirs matérialistes et se détourne, dans sa grande majorité, de la grandeur de l' idéal chrétien.

C' est dire que notre prière sur les bords du Gave sera d' autant plus fervente qu' en tant qu' espérantistes nous nous sentons proches de tous les peuples, auxquels seule la foi en Dieu peut apporter la salut promis aux hommes de bonne volonté. La Paix pour toutes les Nations sera notre thème de réflexion pendant notre séjour lourdais.

Venez donc nombreux à Lourdes. Il reste encore de la place pour les retardataires, mais ils doivent se hâter de se joindre à notre pèlerinage.

A. B.

* * *

## LA BILETO DE LA PREZIDANTO

Post kelkaj semajnoj, ni kuniĝos ĉe la groto de Massabielle (Masabjel')
Pere de Bernadette Soubirous (Bernadet' Subirus), nekonata knabino -sed Dio ofte elektas la humilulojn - la mesaĝo de la Virgino celis al la brila kaj prospera socio de la Dua Imperio, kiu emis preferi la materiajn profitojn ol la spiritajn valorojn. Temis pri alvoko al pentofaro kaj preĝo, sed ankaŭ al espero kaj fido, kiel skribis Daniel Rops.

Tiu alvoko estis aŭdata kaj dum la postaj jaroj, la pilgrimoj al Lourdes (Lurd') ekprogresos despli mirige, ke la tiamaj politikuloj ofte malhelpos la agadon de la Eklezio.

Kiu kuraĝus aserti, ke nun la mesaĝo de Lourdes estas kaduka? Anstataŭ sperti la ekonomian prosperon de la pasinta jarcento, nia nuna socio ja baraktas en malfacilaĵoj kaj spertas la senlaborecon generantan zorgojn kaj priokupojn. Sed la socio daŭre celas la materiajn plezurojn kaj plej ofte rifuzas la noblecon de la kristana idealo.

Tial nia preĝado ĉe la bordo de l' torento Gave estos despli fervora, ke, kiel esperantistoj, ni sentas nin proksimaj al ĉiuj popoloj, al kiuj nur la fido je Dio povas alporti la savon promesitan al la bonvolaj homoj. PACO POR ĈIUJ NACIOJ estas la temo de nia meditado dum nia Lourdes-a restado.

Venu amase al Lourdes. Restas loko por la malfruantoj, sed ili rapidu aliĝi al nia pilgrimo.

A. B.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## JUBILEO DE PASTRO BOURDON

La 10-an de julio 1993, nia ŝatata kaj nelacigebla religia konsilanto festos la 60-an datrevenon de sia pastriĝo. Tiuokaze, ni intencas fari al li donacon. Kiu deziras honori P-ron Bourdon sendu sian kontribuaĵon al la Poŝtĉek-konto de nia asocio A.C.F.E. ROUEN 2 324 93 N.

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

## PROTOKOLO DE LA LASTA KOMITATKUNVENO

La komitato kunvenis la 20-an de januaro en "Parloir du Vieux Colombier" en Paris.

Ĉeestis: F-to Marmou, S-ino Vincent, S-roj Bessière, Colas, Despiney, Pons, Villeneuve.

Petis senkulpigon: P-roj Bourdon kaj Héroux, F-ino Preux.

S-ino Vincent raportis pri la financoj, kiuj estas kontentigaj. Tamen, pro nesufiĉa nombro da partoprenintoj, la kongreso en Francheville postlasis deficiton.

La programo de la pilgrimo en Lourdes estas finfiksita. Oni invitos la episkopon kaj la urbestron al la ceremonio honore al P-ro Peltier. Dum la distra vespero, lumbildoj kondukos nin tra Pireneoj.

La kvar komitatanoj, kies ofico baldaŭ finiĝos, rekandidatiĝas: P-ro Héroux, S-ino Vincent, F-ino Preux, S-ro Lafargue.

En 1994, la kongreso okazos en "Ermitage St-Jean" en Moulins apud Metz de la 13-a ĝis la 17-a de majo. Oni studos la eblecon kongresi en Limoges en 1995.

Dank' al la senpaga laboro de S-ino Vincent kaj F-to Marmou, la bulteno regule aperas je malaltaj prezoj.

La komitato decidas starigi fonduson por fari donacon al P-ro Bourdon okaze de la 60-a datreveno de lia pastriĝo. (v. supre)

P-ro Héroux daŭre zorgas pri la organizado de la ekumena kongreso en Viviers de la 16-a ĝis la 23-a de julio 1993.

Okaze de la nacia kongreso en Pau, oni klopodas aranĝi diservon, verŝajne pere de P-ro Héroux.

La komitato bedaŭras, ke E.K. ne plu aperas depost Junio 1992, kaj esperas ĝian rean baldaŭan aperon.

La venonta kunveno okazos la 16-an de aprilo en Lourdes. Por la oktobra kunveno, S-ro Villeneuve klopodas trovi pli taŭgas lokon ol "Parloir du Vieux Colombier", vere tro brua.

Protokolis A.B.

SKRIBAS LA LEGANTOJ

Per ĉi tiu titolo, mi malfermas novan rubrikon, kiu espereble iom post iom ampleksiĝos, alportante al nia bulteno pliajn temojn primeditotajn.

"Legante la artikolon de nia redaktorino, kiu montris la mallaboremon de la legantoj, mi sentis min trafita de honto. Ve! Ĉu vere neniu ajn atingas nian helpendan redaktorinon? Mia konscienco ŝanceliĝis. Kvankam mi ordinare ne emas verki, mi puŝis min fari almenaŭ etan geston. Iu asertis, ke komenco estas la duono de tuto. Uf! mi rimarkas, ke mi grandŝance komencis. Ĉu mi devas halti? Tute ne, malbona malkuraĝulo: skuu vin, skurĝu vin. Jam naskiĝis la dua parto de mia artikoleto. Hop! puŝu vin, skuu vin, skurĝu vin! Kiu persistas ĉiam atingas la celon. Kaj, iom post iom, malgraŭ mia kutima mallaboremo antaŭ verkado, mi "sukcesis" fari ion, kion nia ĉefredaktorino rajtas cenzuri parte ...aŭ tute!

Roger DESPINEY

"Mi kredas, ke se ni (kredantoj kaj esperantistoj) ne bonege komunikas inter ni - unue - kaj kun aliaj kredantoj, ni precipe havas bonajn intencojn. Laŭ mia opinio, preĝi, kanti... jes, sed tio tute ne sufiĉas. Amu vin unuj la aliajn. La paco de Kristo... Ĉu ni, kredantoj, havas nenion por diri al la jugoslavoj, al la afrikanoj, al la kredantoj? Ili certe havas iom por diri - por demandi! - Ĉu ne? Mi opinias, ke nun ni devas batali kontraŭ la milito, la malsato, la polucio, la izoleco... kaj ni devas komuniki, komuniki!

Georges BON

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

PRI IU PARABOLO?

"La Evangelio proponas la parabolon pri la talantoj (Mat. 25,14). Verdire, mi neniam tute komprenis ĝin, kaj mi alvokas vin, legantoj, por klarigi tiun aferon. Certe, oni povas facile konsideri, ke la servistoj estas ni, kiuj ankaŭ ricevis, se ne talantojn, almenaŭ talentojn uzotajn por la servo de Dio kaj de la homoj. Sed kion diri pri la mastro? Laŭ la tria servisto (kaj li mem tion agnoskas), li estas profitama kaj malmolkora. Luko (19, 12-27) rakontas preskaŭ la saman historion, montrante ĉiam malbonan kaj malamatan mastron. Kiel oni do povus vidi en tia mastro nian Patron, nian Sinjoron?? En alia parto (Luko 6, 34-35), Jesuo petas senprofite pruntedoni. Kaj, alie, Jesuo ja diras, ke neniu povas servi du mastrojn, Dion kaj la monon (Luko 16, 13; Mat. 6, 24). Certe, oni povas diri, ke Jesuo, per la paraboloj, parolas pri mastro tia, kian la tiamaj homoj kutimas vidi, kaj ke Li ankoraŭ nek malkovrigis la veran bildon de Sia Patro nek donis la novan leĝon. Tamen, mi malfacile komprenas tian instigon al la profito, ĉefe per la bankosistemo. Same, mi neniam komprenis la parabolon de la malfidela intendanto (Luko 16, 1-8), kiu laŭdas la malhonestan lertecon Kiu scipovos tion klarigi?

Simone RAVENSTEIN

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

LA SPICOVENDEJO DE LA PARADIZO

Jam delonge mi estis marŝanta sur la vivovojo. Iun tagon mi vidis afiŝon, sur kiu mi legis:"Spicovendejo de la Paradizo". Dum mi estis aliranta, la pordo malfermiĝis kaj jen mi estis ene. Ĉie mi vidis legiojn da anĝeloj. Unu el ili enmanigis al mi korbon dirante:"Mia knabo, zorge aĉetu; ĉio de kristano bezonata kuŝas en la butiko. Kion ci ne kapablas kunpreni hodiaŭ, tion ĉi revenos kunpreni morgaŭ".

Unue mi prenis provizon da pacienco; amo troviĝis sur la sama vico. Iom pli malproksime estis proviza da interkompreno - tion ci bezonas ĉie, kien ci iras. Mi ankaŭ prenis unu-du skatolojn da saĝo, unu-du sakojn da kredo. La Sanktan Spiriton mi ne povis forgesi: ĉar Ĝi estis ĉie. Mi haltis por preni kvanton da forto, ankaŭ da kuraĝo por helpi min en la vetko super la vivkurado.

Baldaŭ plenpleniĝis mia korbo, sed mi ekpensis, ke ankaŭ Gracon mi bezonas. La Savon mi ne forgesis - ĝi estis senpaga. Da ĝi mi prenis sufiĉe por forsavi ĉin kaj min. Poste mi direktiĝis al la vendotablo por elpagi mian fakturon, ĉar mi opiniis, ke ĉion mi havas por plenumi la volon de Dio. Dum mi retropaŝis laŭlonge de la aleo, mi vidis la Preĝon kaj ne povis min deteni meti iom da ĝi en mian korbon, ĉar mi sciis, ke ĉe la eliro le pekon mi estos renkontanta.

../...

Pace kaj Ĝojo abundegis sur la lasta breto; tutapudis Kantoj kaj Himnoj. Mi do servis min. Fine mi diris al la anĝelo:"Kiom mi ŝuldas al ci?" Jen ĝi ridetas kaj respondas:"Tion alportu ĉie, kien ci iros". Mi denove ridetis kaj diris: "Kiom?" Kun rideto jen ĝi respondas:"Jam antaŭ tre longe Jesuo elpagis la fakturon".

Ne forgesu: tio estas semoj.

El "Le messager de St-Antoine" - aprilo 1991)

Trad. Simone BONIOL

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

## AGADRAPORTO POR LA JARO 1992

La jara kongreso okazis en Francheville apud Lyon komence de majo. La domo S-ta Jozefo akceptis nin kaj disponigis vastan salonon por niaj kunvenoj. Ni ankaŭ ĝuis la belegan situon de la domo meze de la Lyon-aj montetoj.

Sabaton posttagmeze, bedaŭrinde sub daŭra pluvo, ni vizitis la malnovan kvartalon de Lyon, sub la gvidado de afablaj tieaj samideanoj, kiujn mi kore dankas. Poste ni ĥavis la dimanĉan diservon en la baziliko Fourvière, kies rektoro afable akceptis nin.

Okaze de nia kongreso, ni sendis al kardinalo Decourtray, ĉefepiskopo en Lyon, diversajn dokumentojn por informi lin pri Esperanto kaj nia agado.

Nia asocio estis enskribita en la jarlibro de la franca katolika gazetaro (v. la septembran bultenon).

Dank' al la akurateco de F-to Marmou, nia diligenta presisto, kaj la senlaca laboro de S-ino Vincent, nia redaktorino, kiu tajpas la tekstojn, la asocia bulteno regule aperis.

Pluraj el niaj membroj partoprenis la Eŭropan Kongreson en Verono (Italujo) kaj la U.K. en Vieno (Aŭstrujo). Kelkaj pliaj ĉeestis la ekumenan kongreson en Hungarujo, staĝojn en Bourosse kaj Grésillon.

En la pasinta jaro, ni bedaŭrinde funebris pro la forpaso de nia longdaŭra membro S-ro Guillon en Orléans.

La membraro iomete kreskis, de 153 en 1991 al 156 en 1992. Tio kuraĝigas nin daŭrigi nian agadon.

A. BESSIERE

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

## FINANCA RAPORTO POR 1992

| ENSPEZOJ | | ELSPEZOJ | |
|---|---|---|---|
| Kotizoj | 5 388,00 | Bulteno | 2 883,63 |
| Donacoj | 2 335,00 | Korespondado | 584,80 |
| Rentumo Ŝparkaso | 479,53 | Vojaĝoj komitatanoj | 2 160,65 |
| Kongreso Francheville | 8 725,00 | Sidejo U.F.E. | 200,00 |
| Pilgrimo Lourdes | 3 125,00 | Kongreso Francheville | 8 756,00 |
| Kotizo pagota al U.F.E. | 260,00 | Diversaj | 71,95 |
| | 20 312,53 | | 14 657,03 |
| En la kaso la 1/1/1992 | 22 488,18 | En la Ŝparkaso | 11 135,80 |
| Pozitiva saldo | 5 655,50 | En la p.ĉ.k. | 17 007,88 |
| | 28 143,68 | | 28 143,68 |

J. VINCENT

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

## NIA MEMBRARO

Novaj membroj 1992: 9) S-ino DELMOTTE (Nord) Koran bonvenon al ŝi!

Membroj bonfarantoj 1993: 1) S-ro SANSON (Essonne); 2) S-ino GUILLOT (Oise); 3) S-ro BESSIERE (S-M); 4) S-ro LECOCQ (I & L); 5) S-ino GILLES (B-Rhin).

Dankegon al ili pro ilia grava subteno!

## FLORADO

Vintre, tiel la seka arbo, kiel la vivanta estas senfoliaj kaj senfruktaj
Sed la someralveno vidigas ŝanĝon inter la branĉoj:
La vivanta branĉo kreskigas foliojn kaj la arbo sin ŝarĝas per floroj kaj fruktoj.

Nia persona somero
Staras en la alveno de Kristo
Nia vintro staras en kaŝita Kristo
Nia somero staras en manifestita Kristo

Nun rigardu: alvenas la somersezono:
"Kiam aperos Kristo, via vivo,
Tiam vi ankaŭ kun Li aperos en gloro" (Kol. 3, 3-4)

S-ta Aŭgusteno

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## FAMILIAJ NOVAĴOJ

Rozkolora libreto: G-roj Villeneuve anoncas la naskiĝon de sia unua nepino, Amandine Le Clainche, bebo de ilia dua filino Carole, la 30-an de decembro 1992.

Nekrologo: ni priploras la forpason de S-ro FARDET EN Nantes, F-ino Vanneau en Nevers. Ambaŭ estis fidelaj dumvivaj membroj.
Forpasis ankaŭ niaj protestantaj fratoj, anoj de nia asocio, S-roj DABEZIES KAJ BACHELIER, ambaŭ en la pariza regiono.

Ni sincere kondolencas al la familioj kaj preĝas por iliaj animoj.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## DIVERSAJ INFORMOJ

1. La Kultura Centro Esperantista (K.C.E.) Poŝtfako 779 Str. Postiers 27 CH-2301 La Chaux-de-Fonds Svislando, finpretigis sian programon 1993. Petu ĝin ĉe la supra adreso.
2. Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140 B-2000 ANTWERPEN Belgujo, preparas grandiozan programon por 1993, en kiu Antwerpen estos kultura ĉefurbo de Eŭropo. Petu ĝin ĉe la supra adreso.
3. Vi povas mendi "L' annuaire de la presse catholique", kiu listigas la katolikajn asociojn (v. agadraporton p. 4) ĉe Eric CROENNE 20, rue Boyer-Barret 75014 PARIS (68 F afrankite).
4. Unu el niaj membroj, S-ro R. LEBRUN 58, route des Andelys 27510 PRESSAGNY l' Orgueilleux, brokantisto, proponas malnovajn esperantaĵojn: revuojn, librojn, poŝtkartojn, kies prezoj iras de 10 ĝis 900 F + sendokostoj. S-ino Vincent povas sendi al vi la detalan katalogon.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## VIVO DE JOHANA JUGAN (Ĵugan)

Filino de malriĉa mara fiŝkaptisto, ŝi naskiĝis la 25-an de oktobro 1792 apud la golfeto de Cancale (Kankal') dum la interna milito, kiu postsekvis la revolucion. Ŝia patro mortis, kiam ŝi estis nur 3-jara. Membroj de la instituto fondita de S-ta Johano Eudes (Ed') en la 17-a jc. sekrete instruis al ŝi la legadon kaj la kristanan kredon.

Dum ŝi deĵoris en familio kiel kuiristino, ŝi vizitis la malriĉulojn kaj respekte servis al ili. Okaze de misio, kiu okazis en Cancale en 1816, ŝi decidis servi al Dio.

En 1817, ŝi forlasis Cancale, lasante sian vestaron al siaj fratinoj, kaj iris al St-Servan por servi la multajn malriĉulojn de tiu urbo. En la malsanulejo "de Rosais" (de Roze), ŝi laboris dum 6 jaroj kiel flegistino. Samtempe, ŝi aliĝis al kongregacio por junulinoj, pli malfrue al la Tria Ordeno de S-ta Johano Eudes, kies aninoj travivis hejme kvazaŭan monaĥinan vivon, dediĉitan al preĝado kaj meditado.

Elĉerpite de sia laboro, ŝi devis forlasi la malsanulejon, kaj iĝis servistino ĉe F-ino Lecocq, kun kiu ŝi amikiĝis kaj vivis dum 12 jaroj, preĝante, zorgante pri malriĉuloj, katekigante infanojn.

(daŭrigota)

TEMO DE LA KONGRESO EN LOURDES (14-19-an de aprilo 1993)

VIVU LA UNIVERSALA KATOLIKA EKLEZIO

VIVU LA UNIVERSALA HOMARA ESPERANTIO

Por ĉiuj katolikoj-esperantistoj, tute ne ekzistas "fremduloj", sed ekzistas "alilandanoj"!

Tio signifas, ke por ili, ĉiuj homoj estas filoj de Dio, kreitaj de la Patro kaj savitaj de Kristo.

Dio disverŝis siajn riĉaĵojn sur la kreitaĵojn (homoj, bestoj...) de la tuta mondo.

Nia impona diskuto povas kaj devas inkludi la jenajn demandojn:

Kiuj estas la ĉefaj, valoraj konvinkoj de:

1. la Katolikoj? ekz. la Papo, Monsinjoro Romero
2. la Protestantoj? Monsinjoro Tutu
3. la Ortodoksoj? Patriarko Atenagoro
4. La Mahometanoj? "La Nobla Korano"
5. la Budhistoj? ekz. la Dalaï-Lama

Ĉiujn, kiuj havas gravajn informojn pri ĉiu aŭ alia religia grupo, oni volonte aŭskultos dum la ĝenerala prezentado aŭ diskuto.

Kelkaj libroj legendaj aŭ eĉ lernendaj:
"Enkonduko al ekumenaj problemoj" (Miziolek, helpepiskopo de Varsovio)
"Une langue pour le monde et pour l' Eglise" (Bourdon o.p.)
La dekreto pri "Eklezio kaj la ne kristanaj Eklezioj" (Dua Vatikana koncilio)

P-ro L. BOURDON o.p.

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

## PREĜOJ AL LA SANKTA SPIRITO

S-ta Spirito, kiu en la pentekosta tago manifestiĝis per la bruo de ventego kaj sub la formo de fajrolangoj, gvidu nin per via milda ago potenca kiel tiu de la vento, por ke, prilumitaj de via lumo, konsumitaj de la fajro de via amo, kaj kirasitaj de via forto, ni estu veraj disĉiploj kaj veraj atestantoj de Kristo, plenaj je fervoro por kunlabori en la ekesto de lia regno en la animoj.

Spirito kiel la vento, nevidebla kaj aganta, foje potenca blovo, kiu kuntrenas nin, kaj pli ofte delikata venteto, kiu montras la bonan direkton kaj milde tien puŝas nin sen trudado, gvidu nin per via diskreta agado respektanta nian liberon. Donu al ni la gracon ne kontraŭstari viajn sugestojn kaj lasi nin obeeme konduki de vi sur la vojo al sankteco kaj savo, kiel la Virgino Maria, kiun vi povis direkti senreziste kaj sanktigi tiom, kiom vi deziris.

Spirito pri lumo, prilumu nin; Spirito pri vero, konduku nin al la plena vero laŭ la promeso de Jesuo; helpu nin bone kompreni la verojn, kiujn li malkaŝis al ni, la aĵojn de Dio kaj de nia sorto.

Spirito, kiu parolas en ĉiuj lingvoj, Spirito pri unueco en la diverseco, instruu al ni la respekton de niaj normalaj diferencoj kaj la efektivigon de la unueco en fido kaj amo en la diverseco de la manieroj per kiuj oni esprimas per vortoj kaj per agoj tiun saman fidon kaj tiun saman amon.

Donu al mi la saĝecon, la talenton aprezi ĉiujn aĵojn je ilia ĝusta valoro kaj konsekvence konduti. Donu al mi la humilecon agnoski mian denaskan malforton kaj la bezonon, kiun mi havas pri la helpo de Dio; donu al mi la konvinkon, ke la teraj aferoj estas provizoraj, kaj ke nenio pli gravas ol Dio kaj lia regno, Dio kaj lia ĉielo. Spirito de Kristo, donu al mi parton en la saĝeco de Kristo.

Kaj donu al mi la veran religiemon, profundan kaj ne supraĵan: la filan Spiriton de Kristo, simplan, sinceran, delikatan, kaj sindonan ĝis morto pro amo al sia Patro.

Ch. SAUTEUR
(trad. J. V.)

## RENOVIGO DE 1/3 DE LA KOMITATO

Instrukcioj por la voĉdonado:

1. Respondu la demandojn 1 kaj 2 sur la voĉdonilo ĉi suba.
2. Enmetu la voĉdonilon (eventuale ankaŭ la rajtigilon) en koverton sen indiko.
3. Enŝovu ĉi tiun en alian, kiun vi sendu al la sekretariino, F-ino Preux, antaŭ la 31-a de marto. Dorse de tiu dua koverto, skribu vian nomon.

N.B. Ne sendu ion plian en ĉi tiu koverto, ĉar oni malfermos ĝin nur en Lourdes, dum la kongreso!

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## RAJTIGILO

Mi, subskribinto (nomo kaj voknomo)

ne povas partopreni la pilgrimon en Lourdes kaj rajtigas

reprezenti min kaj preni mianome ĉiujn decidojn por la bono de F.K.E.A.

Antaŭ la subskribo, skribu mane "Bon pour pouvoir"

Dato kaj subskribo:

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## VOĈDONILO

1. Ĉu vi aprobas la agadraporton? (v. p. 4) JES NE SINDETENO (1)
2. Ĉu vi aprobas la financan raporton? (v. p. 4) JES NE SINDETENO (1)

Renovigo de 1/3 de la komitato. Estas 4 kandidatoj por 4 postenoj. Vi rajtas forstreki aŭ aldoni nomo(j)n, sed devas esti maksimume 4 nomoj entute.

| | |
|---|---|
| P-ro HEROUX André | S-ro LAFARGUE Henri |
| F-ino PREUX Georgette | S-ino VINCENT Jeannine |

(1) Forstreku la senutilaĵojn.

N.B. Ĉu vi atente legis la instrukciojn por la voĉdonado?

DANKON , de Boguslaw SOBOL, el Pollando

Ho Maria gracoplena,
Ĉenstoĥova Dipatrin'
Ni pro viaj gracoj dankas
Pola kaj monda Reĝin'.
Ni vin dankas surgenue
en la preĝo, en la kant'
pro la papaj paroladoj
en la lingvo Esperant'.
Ni memoras Helan Monton
kun dankemo kaj kortuŝ'.
Ne forgesas ni momentojn,
kiam kantis kor' kaj buŝ'.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## KOTIZTABELO 1993

I.K.U.E. kun "Espero Katolika" — 150 F
Peranto: P-ro R. DEGRELLE p.ĉ.k. NANCY 2 555 38 L.

---------

| | | |
|---|---|---|
| A.C.F.E. kun "Franca Katolika Esperantisto" | unuopulo | 40 F |
| | geedza paro | 50 F |
| | infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o | 20 F |
| | bonfaranto | 200 F |

---------

U.F.E. kun "Revue Française" kaj "E° Actualités" — 260 F

U.E.A. kun "Esperanto" kaj Jarlibro — 275 F

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## ENHAVO

1. Le mot du président
2. Protokolo de la komitatkunveno
3. Skribas la legantoj
   La spicovendejo de la paradizo
4. Agadraporto 1992
   Financa raporto
5. Florado
   Familiaj novaĵoj
   Diversaj informoj
   Vivo de Johana Jugan
6. Temo de la kongreso
   Preĝoj al la S-ta Spirito
7. Rajtigilo kaj voĉdonilo

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Dépôt légal: 1er trimestre 1993

C.P.P.A.P. n° 62 532.

Directeur: Albert BESSIERE

Directeur-délégué:
René-Jean MARMOU

!! Polycopié par l' A.C.F.E.(enregistrée le 6
!! mai 1977 à la sous-préfecture de Saumur
!! sous le n° 2523 bis-J.O. 23/05/1977)
!! au prieuré St-Martin
!! 77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
!! FRANCE